

# NIA VOĈO

## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**MARTO 2007**

### **IBERIA RENKONTIĜO 2007. (I-ro 2007)**

Okazos en Madrido inter la 9-a kaj la 11-a de marto en la junulargastejo "San Fermín" (Kvartalo Villaverde de Madrido). Organizas HEJS, Juna Sekcio de HEF.

Pli da informoj : [www.esperanto.es/iro2007/index.htm](http://www.esperanto.es/iro2007/index.htm)

### **ESPERANTO EN AMASMEDIOJ**

La koruso "Verda Stelo" kiun aŭspicias Madrida Esperanto-Liceo partoprenis dum la Sankta Meso kiun elsendis TVE-2 la dimanĉon 4-an de februaro el la preĝejo "San Francisco el Grande" de Madrido. Ĝi kantis "Ave María"-n en esperanto.

Augusto Casquero estis intervjuita en Pola Radio, dum la aranĝo "Arkones" en Poznan (Pollando). "Onda Madrid" intervjuis al Pedro Hernández en vespera programo.

### **E-ILO POR TRADUKI**

La "Institut Universitari de Lingüística Aplicada", asociita al la Universitato Pompeu Fabra, de Barcelono, kunlabore kun la Universitato de Alakanto kaj kun Kataluna Esperanto-Asocio, startigos komence de Marto projekton por la kreo de aŭtomata tradukilo por publika uzado en la Reto, de la kataluna kaj la kastilia lingvoj al Esperanto, al kiu estos aldonitaj poste aliaj lingvoj.

Du membroj de Kultura Asocio Esperantista, Luis Serrano Pérez kaj Santiago Torné Grau, ĝentile transdonis por tiu ĉi projekto la uzo-raĵon de sia antaŭnelonge publikigita "Diccionari Català - Esperanto".

### **ESPERANTO POŝTMARKO**

En decembro aperis en Israelo la dua oficiala poŝtmarko dediĉita al esperanto. Sur ĝi aperas portreto de Zamenhof kun esperanto-teksto. Samtage ĝi estis stampita per unuataĝa porokaza stampo kaj iom poste aperos ankaŭ memorfolio, kiu surhavas la samajn poŝtmarkon kaj stampon.

### **EU-KONFORMA E-EKZAMENSISTEMO**

Esperanto estas unu el la lingvoj elekteblaj por la ŝtataj hungaraj lingvo-ekzamenoj kaj tiel ĝi estas la unua, kiu konformas al la novaj eŭropuniaj normoj. Ekde septembro 2006 lingvokono de esperanto estas same mezurable kaj estas egalrajte agnoskata, kiel la aliaj fremdaj lingvoj.

### **EKSPOZICIOJ**

La ekspozicio pri liberecana memoro plu vojaĝas. Nun en Zaragozo. En la paĝo [http://www.memorialibertaria.org/spip.php?article208&id\\_document=199#documents\\_portfolio](http://www.memorialibertaria.org/spip.php?article208&id_document=199#documents_portfolio) : oni povas vidi panelon kun la klara titolo "Esperanto".

Kun la helpo de Barcelona Esperanto-Centro kaj Hispana Esperanta Fervojista Asocio okazis en Barcelono "Exposició de postals, insignies i cartells en esperanto".

### **AKADEMIO DE ESPERANTO. ALFABETO**

La Akademio de Esperanto konfirmas sian pozicion, jam esprimitan en 1982, ke la ortografio de Esperanto, kiel ĝi estas prezentita en la Fundamento de Esperanto, konformas perfekte al la karaktero de la lingvo, kaj ke neniu ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda.

Nur kiam la cirkonstancoj ne permesas uzi la ĝustajn supersignojn, kaj kiam pro apartaj bezonoj la Fundamenta anstataŭa skribsistemo (ch, gh, hh, jh, sh, u) ne estas oportuna, oni povas anstataŭigi la supersignajn literojn per aliaj signoj aŭ signokombinoj. Tian anstataŭigon, kiam ĝi estas nura teknika rimedo, ne celanta reformon de la ortografio de Esperanto, kaj kiam ĝi neniel kaŭzas konfuzon, oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentan.

Ekzistas ankaŭ aliaj cirkonstancoj, kiam nia lingvo estas prezentata alimaniere ol per la normala skribo, ekz. en stenografio, morse, brajle, per fonetika transskribo k.s., kaj kiam teksto esperanta estas konservata aŭ transsendata elektronike en cifereca formo laŭ diversaj kodsistemoj, kaj ankoraŭ aliaj similaj okazoj. Ankaŭ tiajn manierojn skribi, transskribi aŭ prezenti nian lingvon oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentajn.

Geraldo Mattos. Prezidanto de la Akademio de Esperanto

**UEA AL LA NOBEL-PREMIO PRI PACO- 2008**

La jaro 2008 estos la centjara jubileo de la fondo de UEA. Kaj ties celoj por la interkompreniĝo de la popoloj, ties ligiloj kun UN kaj UNESKO, ties agadoj dum la mondmilito kaj pli lastatempe en eks-Jugoslavio, Afganio kaj Centrafriko, objektivite pravigus la aljuĝon de la Pacpremio de 2008 al nia tutmonda asocio. Jam komencis la kampanjo por kolekti apogojn de eminentuloj kaj aliaj asocioj.

**ESPERANTO EN INTERRETO**

Per la retejo [www.eklaboru.com](http://www.eklaboru.com) oni povas trovi laboron aŭ laboranton per esperanto. Per la retpaĝaro dungonto kaj dungoto povas interkontaktiĝi .

Funkcias en Ĉinio ekonomia retejo en esperanto, pri NASDAQ kaj pri akciaj informoj: <http://ekonomio.net>  
Oni kreis retan enciklopedion pri Madrido, laŭ la stilo de Vikipedio, ĝi nomiĝas Madripedia. Toño del Barrio jam verkis artikolon pri Esperanto en Madrido: <http://www.madripedia.es/wiki/Esperanto>. Vi povas ĝin kompletigi aŭ korekti. Ekzemple, oni ne mencias ĉu ekzistas broŝuroj pri Madrido en Esperanto. Aŭ oni povas aldoni eldonojn kaj literaturaĵojn.

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere (17,00-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es)

INFORMO pri la **Hispana Esperanto-Kongreso 2007** Palos (Huelva) ekde 5a ĝis la 8a de julio.  
<http://congreso.esperanto-andalucia.org> (hispane) kaj  
<http://kongreso.esperanto-andalucia.org> (esperante)

Dum la Ĝenerala Eksterordinara Kunveno de HEF (26-an de februaro en Madrido) oni aprobis la kontojn de la asocio por 2006.

HEF vendas po 4 eŭroj (5 kun sendo-kosto al Hispanio) la DVD (por uzi en komputilo) "Elektronika Esperantio" la plej ampleksa informilo pri esperanto.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Laj konversacia-rondoj kiun organizas Madrida Esperanto-Liceo okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7 Tel. 91 446 80 79.

KURSOJ:

**Vallecas.** Pedro Hernández organizas bazan kurson, sabate je la 17,00-a horo kaj je la 18,30-a meza nivelo. Tel. 91 507 90 84/85 kaj 667 721 951 .

**Tetuán.** Alejandro Pareja gvidas bazan kurson en "Biblioteca Pública Vázquez Montalbán", Francos Rodríguez 67, (Metroo Francos Rodríguez). La kurso estos por komencantoj, senpaga, kaj la lecionoj okazos la mardojn je la 7a vespere. Aliĝu ĉe la biblioteko, 91 398 07 23 .

PRELEGOJ: 19an de marto. "La Fajra Festo de Valencio", ĉe HEF: Rodríguez San Pedro, 13, 3º, Madrido.

**La kotizo de MEL por la jaro 2007 estas 12,00 eŭroj**

Vi povas pagi la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid, Banco Sabadell/Atlántico konto  
0081 7110 98 0001266730

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**

Asociación de Utilidad Pública Municipal  
San Alejandro 6- 4ºB EXT  
28005 Madrid

## “EL DÍA”. Ciudad Real 28 enero de 2007

### - CULTURA -

La Asociación Manchega de Esperanto enseña el idioma de la humanidad Escapando de Babel Guerras, muerte, violencia, desconocimiento, miedo al otro y más guerras.

Si el diálogo no fue suficiente en la Historia Universal, y mil ejemplos nos advierten que sigue sin serlo en la actualidad, ¿qué falla en el diálogo? ¿Por qué los países no se entienden? ¿Seguimos tropezando contra la torre de Babel?

Tratando de huir del castigo divino de la incomunicación, el doctor polaco Lejzer Ludwik Zamenhof ofreció una respuesta a finales del siglo XIX: las lenguas nacionales no permitían una comunicación eficiente más allá de las propias fronteras.

Así que, en 1887, Zamenhof hizo una fantástica aportación llamada a liberar la tensión entre los países de todo mundo y a igualar la comunicación fuese cual fuese su procedencia.

Una aportación que, tras una época de letargo, ha vuelto a despertar con más fuerza que nunca en la era Internet: el esperanto.

El esperanto se trata de una lengua planificada, es decir, “diseñada conscientemente por seres humanos”.

La idea del polaco no fue otra que la dotar a todas las naciones de un modo de entenderse sin implicar que una lengua se erigiese sobre las demás, lo que conllevaría una supremacía de un país sobre otros.

La única manera de lograr esto suponía el uso de una lengua distinta que no perteneciese a ninguna nación y que, a la vez, fuera propiedad de todos los países por igual.

Y esta característica describe uno de los puntos del ideario en el que descansa el esperanto: el compartir los recursos con la comunidad, por la armonía y la concordia entre los pueblos.

#### **Una lengua que se comparte, en la que todos y ninguno son dueños por igual.**

“Zamenhof dotó al esperanto de un sentimiento de universalidad: era para ricos y pobres, para blancos y negros, todos podrían aprenderlo”, nos explica Arturo Jiménez, de 30 años, filólogo y esperantista fundador de la Asociación Manchega de Esperanto con sede en Ciudad Real.

Para Arturo, el éxito del esperanto se debe a que el polaco se planteó la finalidad real de crear un idioma así, insuflando a su aportación de una ‘idea interna’, un ideario solapado al mismo esperanto, en ningún caso político, sino humano: paz, amistad, solidaridad, fraternidad y entendimiento.

Estas palabras imantaron rápidamente al movimiento anarquista y a la izquierda en general, grupos que siempre vieron la lengua inventada por Zamenhof como algo afín.

Por otra parte, la derecha ha considerado siempre al esperanto como un globalizador, “pero no en el sentido que hoy tiene la globalización, sino en la esencia de ‘todos iguales, pero de verdad’”, matiza el joven filólogo. Arturo insiste, por otra parte, en que a pesar de esto, el esperanto carece de afiliación ideológica alguna “salvo la suya propia”.

#### **El estigma de la igualdad**

La Primera Guerra Mundial y la fundación de la Sociedad de Naciones Unidas pusieron de relieve en el primer tercio del siglo XX la necesidad -más urgente que nunca- de un entendimiento real entre los países.

Entonces, el aprendizaje de idiomas era accesible a unos pocos y no se realizaba de una manera del todo afinada. El diálogo en la Sociedad de Naciones era arduo y el esperanto emergió con fuerza, desarrollándose espectacularmente como clara solución para evitar los conflictos internacionales.

Pero el esperanto ya había comenzado antes su andadura, con la organización de congresos anuales, cada año en una nación.

El quinto, que tuvo lugar en el año 1909 en Barcelona -con 1.500 asistentes-, fue inaugurado por Zamenhof acompañado por el mismo rey de España de entonces, Alfonso XIII.

Efectivamente, el óptico vivió en un momento en el que encontrar una lengua universal era un asunto considerado por los Estados.

Mientras que en Europa seguía evolucionando, el desarrollo del esperanto se truncó devastadoramente en España a raíz de la Guerra Civil.

Con la ascensión del franquismo, la lengua fue estigmatizada por su afinidad a la izquierda y hasta los años cincuenta “estuvo muy mal vista”.

De hecho, existen muestras de cartelería propagandística de grupos anarquistas escritas en esperanto.

#### **La bola de nieve que crece**

Tras crear las reglas fundamentales de su invento lingüístico, Zamenhof comenzó a difundirlo desde su núcleo más cercano: sus familiares lo aprendieron en primer lugar.

Luego, publicó El fundamento -las 16 reglas básicas del esperanto- e inició un voluminoso envío fuera de Polonia.

En 1923, el esperanto marca su primer hito y reúne a casi 5.000 personas en Alemania.

En 1966, son 4.000 esperantistas los que acuden al congreso en Hungría, y en 1987 Polonia congrega a casi 6.000 personas.

En España, el último congreso tuvo lugar en 1993, en Valencia, donde se dieron cita cerca de 2.000 esperantistas.

Este año el esperanto cumple 120 años, y está más vivo que nunca. Internet ha favorecido una difusión nunca antes conocida, permitiendo que cualquiera, en cualquier lugar, pueda aprender el idioma a través de cursos por correo electrónico.

Así comenzó Arturo esta aventura: "En la red puedes encontrar métodos de lo más básico a lo más avanzado, y allí también te das cuenta de que el esperanto está presente en todas las ramas del saber: hay traducciones, originales, y se puede encontrar cualquier palabra técnica y científica".

Además, la otra clave del esperanto reside en que permite el entendimiento con el otro desde su nivel más básico.

De hecho, Raúl Martínez, secretario de la asociación, estudió la lengua durante tres semanas para irse a un congreso. Y pudo comunicarse con naturalidad.

### **El fundamento**

El esperanto está regulado por 16 reglas 'intocables' que tienen por fin preservar su simplicidad: no existe irregularidad alguna, ni género, ni personas verbales.

Además, su estructura es flexible, ya que sujeto, verbo y complementos se colocan de manera aleatoria. El sustantivo acaba en -o, el adjetivo en -a y el adverbio en -e.

En los verbos, el tiempo presente finaliza en -as y el pasado en -is. Zamenhof lo desarrolló usando 900 raíces, principalmente latinas, anglogermanas, indoeuropeas, y asiáticas.

"Se dice que el esperanto es léxicamente latino, estructuralmente japonés o turco y sintácticamente parecido al chino", explica Arturo.

A partir de El fundamento, el esperanto puede seguir evolucionando, desarrollándose como cualquier otra lengua.

De hecho, ya existen casos de hablantes de esperanto de nacimiento.

Los últimos estudios contabilizan alrededor de dos millones de personas en el mundo que hablan y entienden el esperanto.

En términos más gráficos: la mitad de hablantes de danés que existen en el planeta. No está mal.

### **El esperanto en la UE**

Según lo estableció su mismo fundador, el esperanto no pretende suplantar a las lenguas nacionales, sino que sea utilizado como lengua auxiliar relaciones internacionales.

De manera que, en el momento en el que crucemos nuestras fronteras, nos comuniquemos en esperanto, sin imponer ninguna lengua a nadie.

En los últimos años ha florecido un movimiento en el seno de la UE en favor del uso del esperanto como idioma de trabajo.

Existe ya un partido político de esperantistas europeístas que apuestan por este cambio.

Sólo en cifras, ya compensa: el 34% del presupuesto de la UE se dedica a gastos en papel e intérpretes. "Nos queda un 66% para hacer lo que queremos hacer: que si la OCM del vino, del aceite..."

El gasto en intérpretes sería un recurso muy importante para destinar a otras acciones", asegura el filólogo.

La propuesta supone trabajar en esperanto, idioma en el que también se publicarían las resoluciones.

Luego, cada país financiaría la traducción de las mismas en las lenguas que quisiese: catalán, castellano, etc. Todo a cuenta del país o la Comunidad Autónoma correspondiente, claro.

Hungría es el único país de la UE que sí reconoce el esperanto de forma oficial, se enseña en la Universidad y tiene titulación propia.

Su ejemplo puede ser un comienzo. ¿Realidad o utopía? "Creo que será una realidad el esperanto como lengua de trabajo en la UE", opina Arturo, "pero quizá no lo llegue a ver.

O todo sea que, por una vez, las letras sean como las ciencias y avancen una barbaridad".

Ciudad Real es de los pocos lugares dentro del país donde se puede recibir clase de esperanto, los jueves y domingos, en la tetería Pachamamá, impartidas por Raúl y Arturo.

"Yo soy un culo inquieto, me metí porque me interesaba", comenta Israel Muñoz, que se autodefine como "alumno horroroso" a pesar de la facilidad del idioma.

Miriam Muñoz y Rodrigo Manchado, que asiste junto a buena parte de su familia, son otros de los incondicionales de estas clases.

Con el esperanto se cumple, para Arturo, un 'milagro': fue creado por un hombre no especialista en lingüística, consiguió alcanzar el pragmatismo de "lo más simple" e insufló vida propia a su creación, con el fin de evitar que muriese con él.

El milagro sigue danzando, con nueva energía, para reivindicar que la comunicación es la única forma de enderezar el mundo.

Y el esperanto, la mejor arma para sobrevivir a Babel y su castigo divino.

informa

PATRICIA C. SERRANO